ISSN:0871-9241

# NiaBulteno

OKTOBRO-DECEMBRO 2012 OUTUBRO-DEZTEMBRO • Numero **96**

**Informa Bulteno de Portugala Esperanto-Asocio**
***Boletim Informativo da Associação Portuguesa de Esperanto***

Rua Dr. João Couto, 6-R/cA, PT-1500-239 LISBOA • +351 +217 141 359 • asocio@esperanto.pt • www.esperanto.pt

## Magistriĝo pri esperanto

InesG




*ISCTE-Sociologo Sónia Apolinário diplomiĝis kun 19⁄20-a aprobo.* **Pĝ.8**

InesG



WB



Ĝenerala Asembleo 2013:

# Alcino Alves HONORA MEMBRO!

*Krone de 20 jaroj da solida, intensa, kaj efika laborego.* **Pĝ.8**

## 2013-2014: Malmultaj ŝanĝoj

*La ĝisnuna skipo prezentiĝas por la sekva mandato kun nur tri novaj nomoj; nul novuloj en la kandidata estraro.* **Pĝ.4**

## Zamenhoffesto kun 6 novaj diplomitoj

*Malstreĉa etoso regis sideje la 15-an de decembro, semajnon post ekzamensesio.* **Pĝ.6**

**Grave & ĵuse:** Sidejo riskas perdiĝon! (pĝ.7) Ĉu UK ĉe ni en 2016? (pĝ.7) Eusébio donacas la muelejon! (pĝ.3)

***Nia Bulteno*** (informa bulteno de **Portugala Esperanto-Asocio**)
N-ro **96** (2011.10-12) ISSN:0871-9241
**Redaktis:** A. Martins-Tuválkin
**Reviziis:** A. S. Almeida; Eduardo Crispim
**Eldonkvanto:** 280 ekzempleroj
**Abono (4 n-roj/j., nur ekster PT):** ⅕ de via landa M.A. de U.E.A.
**Unuopa ekz. (93-96):** 5,00 €
**Rete:** http://www.esperanto.pt/dok/nb096.pdf
**Finkompostita en:** 2013.04.22
**Limdato por *NB*96:** 2013.05.30
**Kontakto:** ‹bulteno@esperanto.pt›



**Portugala Esperanto-Asocio**
***Associação Portuguesa de Esperanto***
*(pessoa coletiva de utilidade pública)*

⦿ sabate 15:00-19:00; sideje
✉ Rua Dr. João Couto, 6 r/c A
PT-1500-239 LISBOA
☎ +351 217 141 359
☎ +351 261 988 181
✉ ‹info@esperanto.pt› *(português)*
‹asocio@esperanto.pt› (esperante)
⌂ http://www.esperanto.pt/
⦿ ‹pea_diskut@googlegroups.com›
⦿ http://www.facebook.com/pages/Portugala-Esperanto-Asocio/142303665812941
‹traduzir@esperanto.pt› *(traduções)*


***CAE***: 91331 ***NIF*:** 501 547 312
**Fondita** en 1972.04.25
**Landasocio** de U.E.A. ekde 1979
**Kom.-Obs.:** Faria de Bastos
**Membroj:** 97(+63) en 2013.04.15
**Monata kotizo:** 3,00 € (emeritoj kaj sub-18-jaruloj: 2,00 €; nepagpovaj: 0,00 €)
**Aniĝkotizo:** 5,00 €
**Pagojn al bankkonto:** (***BIC*:** CGDIPTPL) ***IBAN*:** PT50 0035 0640 00 025 961 430 49 **aŭ** ***NIB*:** 0035 0640 00 025 961 430 49

### *Gvidorganoj:* (ekde 2013.03.30)

***Ĝeneral-Asemblea Stabo:*** ‹asembleo@esperanto.pt›
**Prezidanto:** Rui Q. Valério
**Sekretarioj:** Jorge de Matos; Luna M. Nunes

***Estraro:*** ‹estraro@esperanto.pt›
**Prezidanto:** José Martins
**Vicprezidanto:** Wílson Brígido
**Sekretario:** ‹sekretario@esperanto.pt› A. Martins-Tuválkin
**Kasisto:** ‹kasisto@esperanto.pt› Vítor Marques
**Voĉdonantoj:** Iuri Gaspar; Nuno Magalhães; Luís Oliveira

***Kontrol-Komitato:*** ‹kk@esperanto.pt›
**Prezidanto:** Francisco Melo
**Revizoroj:** Miguel Boieiro; Nádia Penas

### *Nebalotitaj Postenoj:*

**Lernado:** ‹lernado@esperanto.pt› Nádia Penas; Iuri Gaspar
**Libro-Servo:** ‹vendejo@esperanto.pt› Rui Q. Valério
**Biblioteko:** ‹biblioteko@esperanto.pt›
**(libroj)** Wílson Brígido
**(periodaĵoj)** Wílson Brígido
**(eltondaĵoj)** Martins-Tuválkin
**(diversaĵoj)** (vakas)
**(fotarkivo)** A. S. Almeida
**Gazetaro:** ‹imprensa@esperanto.pt› (vakas)
**Eldonoj:** ‹eldonoj@esperanto.pt› A. Martins-Tuválkin
**Subvencioj:** (vakas)
**Ekspozicioj:** (vakas)
**Komputservo:** ‹admin@esperanto.pt› Nuno Magalhães; Luís Oliveira; A. Martins-Tuválkin
**Sidejmastrumo:** Pedrosa Alves; Marta Martins

### *Honoraj Membroj:*

António da Silva Almeida
Olga Serra Marques Almeida ⚱
Alcino Ramos Alves
Manuel de Freitas ⚱
Alsácia Fontes Machado ⚱
Alberto Pedro da Silva ⚱
Adelino Franco Simões ⚱
Manuel Maria Sousa Teixeira ⚱

### *Junulara Sekcio:*

**Portugala Esperanto-Junularo**
***Jovens Esperantistas de Portugal***
**Fond.:** 1993 **Membr.:** 7 (L.S. de TEJO ekde 1996)
⌂ http://www.esperanto.pt/pej.htm
✉ ‹pej@esperanto.pt›
⦿✉☎ ĉe P.E.A.

### *Lokaj Sekcioj:*

**PLUS — Portugala Loka Unua Sekcio** (nordokc. sekcio; neag.)
**Repr.:** Nuno Magalhães
**Fond.:** 2002 **Membr.:** 20
⦿ Kafejo "*O Piolho*", Leonplaco, Oporto (antaŭavertu!)
✉ Rua Paulo da Gama, 550-12º A
PT-4150-589 PORTO
✉ ‹plus@esperanto.pt›
⌂ http://www.esperanto.pt/plus.htm

### Aliaj Landaj Organizoj:

*(sendependaj de Portugala Esperanto-Asocio)*

**Regiona Esp.-Asocio (*Ourém*)**
⌂⦿✉☎: (anoncotaj; *NB*91:4)

**Saluton! — *Cooperativa dos Amigos do Esperanto e da Natureza***
✉⌂ Avenida Bissaia Barreto, 2
PT-3360-191 PENACOVA

### Landaj Reprezentantoj:

**U.E.A.:** Manuel Pinguinha
**TEJO:** (vakas)
**E.E.U.:** Luís Ladeira; José Martins
**ILERA:** Francisco Melo (CT1CGE)
**EJA:** Faria de Bastos
**SAT:** Pedrosa Alves (kotizp.)
**IKEK:** Alcino Alves

### Numeroj kaj Referencoj

Ekz.: «*NB*12:3-4» indikas pĝ. 3 ĝis 4 de *Nia Bulteno* n-ro **12**. Aliaj: *Bb* (*Bubo*); *IL* (*Informa Letero*); *ELV* (*Esperanto — Língua Viva*); *NS* (*Nia Stelo*); *LK* (*La Karavelo*); *RPE* (*Revista Portuguesa de Esperanto*); *SI* (*Saudação Informilo*).
**Sgnf. de logotipo kun numero:** ★1234/567 aŭ ★1234: asociano; ★12.345: Libro-Serva varkodo; **bibl.:** ★B1234 aŭ ★BA123: libro k.s.; ★i123: periodaĵo; **albumoj:** ★F1234: foto; ★G1234: eltondaĵo.

## *Subitaj zorgindaĵoj devigis transformi nian informilon, kutime trankvile paŝtaktan, al turbina novaĵcentralo. Tial sur ĉi paĝoj vi trovos kaj anoncojn kaj raportojn pri eventoj okaz-ontaj/-intaj, kaj miksaĵon da sciigoj ĵusaj (tiome, ke ili preskaŭ mankas kovrile, por eviti lastminutan rekomposton) kun aliaj jam tri monatojn malnovaj. Tio ja informu vin, kaj instigu al agado, dum ĝi ankaŭ pensigu pri la senritma fluo de la eventoj kiuj konsistigas kaj kondiĉigas nian agadon: Jen barilo kiu spitas detalplanemon, superebla tamen per improviza elturniĝemo — tiu duklinga amuleto kiu pendas zone de nia nacia kostumo.* **Red.**

ASSOCIAÇÃO:

### *Assembleia Geral dos sócios da Associação Portuguesa de Esperanto*

# *Aviso Convocatório*

Nos termos do artigo 22º dos estatutos desta Associação, convoca-se a Assembleia Geral para reunir em sessão ordinária no próximo dia 30 (trinta) de março, sábado, pelas quinze horas, na sede da mesma, sita no rés-do-chão A (á) do número 6 (seis) da Rua Dr. João Couto, ao Calhariz de Benfica, em Lisboa, com a seguinte ordem de trabalhos:

1. Apreciação e votação do **Relatório e Contas** referentes ao ano de 2012, ouvido o parecer do Conselho Fiscal.
2. Eleição dos **Corpos Gerentes** para o mandato 2013-2014.
3. Apreciação e votação de proposta de atribuição da categoria de **Sócio Honorário** a Alcino Ramos Alves, apresentada pela Direção.

Fica desde já convocada a Assembleia Geral para reunir trinta minutos mais tarde, no mesmo local, se à hora marcada não se tiver formado quórum.

Lisboa, 1 de Janeiro de 2013
Pel'A Presidente da Mesa,

os secretários
***Rui Queiroz Valério*** e ***Francisco Dias Melo***

ARANĜOJ:

# *IRo9 preskaŭ sen ni*

Nur la ĉeesto madride de Paulo Branco, konata portugala bruselano, pravigis (apenaŭ!) la signifon "iberia" pri la nomo de tiu ĉi aranĝo (*NB***93**:9; *NB***91**:3). La ekonomia krizo malhelpis ne nur nin: Katalunoj, kutime abundaj, ĉeestis ankaŭ nur unu, Ferriol Macip. Madridanoj tamen , kune kun aliregionanoj kaj kun eĉ kvar eksteriberianoj, konsistigis plenan kvindekon. La programo, varia kaj alloga, okazis laŭplane. **IRon10** organizos KEJ ĉ. marto 2014; el nia lando longas veturi, do ni frue (kun)planu! ***AMT***

ASOCIO:

# *Ni muelejon*

Ree nia tre agema Eusébio dos Santos (*NB***91**: 25) surprizigas la movadon per pozitiva iniciato: Jen ĵuse (2013.03.09) li sciigis al la estraro intencon **donaci al P.E.A.** sian hejmon — pitoreskan **vilaon** kun iama muelejo montpinte en *Cacém*, inter Lisbono kaj Sintro. La detalaj kondiĉoj nune diskutatas (*NB***97**). ***AMT***

SIDEJO:

# *Plikomputi*

La sideja telefon- kaj forkomputret-aliro estis januare laŭpete alikonektita al la **optikfibra** reto de *Portugal Telecom*, anstataŭante la ĝistiaman konekton al la samfirmaa kuprkabla dratreto. Krom konektplirapidon, tiu ŝanĝo alportas financan gajnon pro la pli favora tarifo je vokoj al ĉelajnumeroj, kaj pro unua-jara rabatkampanjo.

Pliriĉiĝis ankaŭe nia ilaro per **ekstera stordisko**, donacita januare de A. S. Almeida, kiu utilos (ja la disko) kiel konstanta sekurkopiejo, konektita USB-e al la sideja komputreto el kirasa ventolata seftirkesto. ***AMT***

ASOCIO:

# *Sen Gaspar, nek Gagarin*

***Luna M. Nunes***

La 30-an de marto 2013, okazis en la sidejo la ĉiujara ordinara kunveno de la Ĝenerala Asembleo de Portugala Esperanto-Asocio, gvidata de stabo ĉi--jare prezidata de Rui Valério kaj sekretariata de mi, pro neĉeesto de antaŭaj postenuloj. Ĉeestis la kunvenon dek homoj, duono ne apartenanta la kandidataron, kiu estis alproponita kaj favore unuanime voĉdonita.

Komenciĝo estis planita por la tria posttagmeze (pĝ.3), sed nur ĉirkaŭ la kvara ĝi fine ekiris antaŭen. Iom post iom alvenis la tiamaj kunvenaj parto--prenontoj, kiuj preskaŭ sukcese plenigis la tutan salonon.

Ĉar estis mia unua fojo parto-preni Ĝeneral-Asemblean kunvenon, mi tial opiniis la etoson tre serioza kaj eĉ iomete peza, tamen, mia-perspektive, oni ne esperu ion tre malsaman, ĉar tiuj ĉi kunvenoj kutime estas tiaj. Por mia (kaj eble ĉies) surprizo, brilis iom da gajo subite tiam, kiam Wílson Brígido, leganta la pasintjaran protokolon ŝerce menciis ne estraranon Iúri Gaspar, sed Jurij Gagarin, la faman astronaŭton. Tiu ĉi ŝerceto pelis min havi pli bonan impreson pri io, kio unue mi timis esti teda kaj malloga.

Pritraktiĝis tiutage la spezoj de la asocio en la jaro 2012, la samjara estrara agadraporto, kaj ankaŭ la atribupropono de la honormembra kategorio al la samideano Alcino Alves (pĝ.5), kiun mi ankoraŭ ne havis la ŝancon ekkoni, sed pri kiu mi jam multe aŭdis. Ekster la tagordo, diskutiĝis la grandigo de la sidejlupago, kadre de la nova leĝreĝimo pri loĝejaj lukontraktoj (pĝ. 7); kaj la kondiĉa donaco fare de D-ro Mário Eusébio dos Santos (pĝ.3), donaco tiu, kiu jam estas kontrolata detale de D-ro Miguel Faria de Bastos, paralele kun la supre menciita lupago.

Post la kunveno, okazis en la sideja saloneto plaĉa kaj modesta manĝarango, kie haveblis por manĝi kelkaj biskvitoj kaj telermeze blankaj diskoj, kiujn mi pensis esti ornamaĵoj, sed kiuj fakte manĝeblis (rizpufaĵoj). Por trinki — kamomila kaj verdtea tizanoj. Mi trinkis la kamomilan kaj tio sentigis min iom neesperantista… Muziko venontfoje certe estus ankaŭ bona ideo aldonota, ĉar forironte mi rimarkis, ke la nuboj malsereniĝis kaj ĝenerale muziko estas helpilo por priforgesi malbonan veteron. Ĉia-okaze, la posttagmezon oni pasigis bone kaj kune, kio sendube plej gravas. ▮

---

*KANDIDATARO "A":*

La Ĝeneral-Asemblea Stabo ricevis ĝis la kunvendato nur unu kandidataron por posteni la gvidorganojn de P.E.A. en la mandato 2013-2014. Temis pri daŭriga skipo, kun malmultaj ŝanĝoj (vd. pĝ.2, kp. *NB*95:2): Plirangiĝas Rui Valério, migras Francisco Melo, eliras la honoraj membroj, revenas Nádia Penas, dum novas Jorge de Matos kaj Luna Nunes. En la estraro neniu nova nomo; lokŝanĝas A. Martins-Tuválkin kaj Iuri Gaspar. Notindas rekorde juna Stabo (avĝ. aĝo: 34 jaroj!). *AMT*

ARANĜOJ:

La unuan (longan) semajnfinon de oktobro okazos kiel anoncite la **27-a Renkontiĝo de Portugaliaj Esperantistoj**, en *Mora*, kun loka organizo de José Lagartixa. Preparatas interesa programo. Ĉeestontoj anoncu sin telefone, letere, retpoŝte, aŭ per *Facebook*. ***AMT***

LERNADO:

# *Kurson Salkastele*

Sep lernantoj, aĝaj inter 6 kaj 63 jaroj, ĉeestas bazan kurson de esperanto en "*Sopa*", iama almozmanĝejo kaj nune municipestrara kulturejo en Salkastelo (*Alcácer do Sal*). Instruas lokano Nádia Penas, kiu ankaŭ preparis kaj organizis la tuton, eĉ se baldaŭ patriniĝonta. La lecionoj ekis martfine kaj okazas vendredojn, laŭ la libro *Esperanto em Método Ilustrado* (★01.023). ***AMT***

GAZETARO:

# *Jam 701 eltondaĵoj*

Progresas la kompletiga komputila katalogado de artikoloj pri esperanto kaj rilataj temoj aperintaj en la portugalia gazetaro: Aldoniĝas konstante el la pli malnovaj eroj de niaj albumoj (jam plene malĝis 1940), el vere novaj eroj (eĉ se ne multaj: nur tri en 2012), kaj el nove trovitaj malnovaĵoj. Septembre finordiĝis albume ĉiuj eltondaĵoj akumuliĝintaj sideje: Al la laboro de Olga Almeida (*NB*~~**91**~~:17), ĝis 2009, kuniĝis disaj kolektoj ĉerpitaj el plurtemaj arĥivoj arigitaj de iamaj sekretarioj Gonçalo Neves, Werther Sacramento, kaj Alcino Alves, kaj de iama gazetara komisiito Gonçalves Pires. Laŭplane la tuto estos skanita kaj enretigita kune kun la kataloga datenbazo, por kio tamen ne estas ankoraŭ limdato. ***AMT***

LERNADO:

# *Lernu.net kun pli ol 600 portugaloj*

Ek de sia komenco, en 2002, la esperanto-lerniga retejo *Lernu!* (http://eo.lernu.net/ *NB***88**:5) allogis nia-landajn komencantojn: Notindas portugalaj lernu-anoj kun fruaj vicnumeroj kiaj 181 aŭ 194. Dek jarojn poste, 636 el ties 153 473 uzantoj indikas Portugalion kiel sian loĝlandon aŭ aliiel rilatas al nia lando. Plej multaj el tiuj aniĝis al la retejo pro nedaŭra interesiĝo pri esperanto kaj tial ne kontaktindas kiel lernintoj aŭ eĉ lernontoj, sed ja ilia nombro estas indiko, ĝis nun nekonebla, pri tiaj efemeraj interesiĝoj (kian apenaŭ eblas ekkoni el libro-vendejo aŭ lingvo-foiro), kio estas grava ilo por ebla seriozigo de tiaj momentaj lernemoj. Tamen *Lernu!* ankaŭ ebligas al nia asocio kontaktiĝon kun novaj esperantistoj. Entute 11 el la nunaj asocianoj ekkonis esperanton per ĝi, kaj inter la neasocianoj esperantistoj aŭ komencantoj (*NB***95**: 6-7) estas 121 *Lernu!*-anoj — tio estas ja vastega kampo por trovado de interesatoj integriĝi en la movadon. Tiuj kontakt- kaj lingvnivel-informoj estas senkaŝe koneblaj al aliaj uzantoj, sed ties daŭra aktualigo, pro la kreskanta nombro da kontrolatoj, fariĝis tre laboriga. Tial, oktobre de 2012, Miguel Fonseca (iam longe la sola asociano bazlernejaĝa, nune sperta komputisto) aŭtomatigis la profilkonsultadon, kio nun ebligas facilan superrigardon kaj kontaktadon de tiom da lern(u)emuloj. ***AMT***

ARANĜOJ:

# *Improvizado en sideja Zamenhoffesto*



InesG *La plej alta baznivela aprobpoentaro…*



InesG *…kaj la plej alta meznivela.*



InesG *Iuri Gaspar; Filipe Sim-sim; José Martins.*



AMT *Jaime Correia kaj nepo; Correia Marques; Antónia Carvalho kaj amikino.*

Sabaton, la 15-an de decembro 2012, ĉ. 25 esperantistoj (inkl. eksterlisbonianoj) plenigis la sidejon de P.E.A. por tutposttagmeza programo, festante la 153-an Zamenhof-datrevenon, malfermita per bonhumora akcepto far estrarprezidanto José M. Martins. Laŭprograme, tri prelegoj markus laŭvice tri kromajn jubileojn (*NB*95:3), sed nur la unua faktis laŭplane: Sónia Apolinário prezentis "neteknikan" version de sia diserto (pĝ.:8) okaze de 120 jaroj de esperanto en Portugalio. La du aliaj jubilemarkaj prelegoj iom reduktiĝis: Okaze de la 125-jariĝo de nia lingvo, la libreton *Zamenhof kaj volapük* (Iltis: *Bad Bellingen*, 2012. 44pĝ.; *NB***92**:8), kiel anoncite, anstataŭ la aŭtoro Gonçalo Neves, priraportis post ĵusa legado A. Martins-Tuválkin. Sekvis iom hazarda dismontrado de arĥivaj fotoj sur murekrano, kun scenoj kaj figuroj de la asocia 40-jara historio. Sekvis la ĉefa programero, diplomigo de ĵusaj ekzamenitoj (*NB***95**:8) — kiun bedaŭrate ne povis gvidi instruisto Nádia Penas, pro foresto. Ankaŭ ne ĉiuj diplomotoj ĉeestis kaj tiel la estrarprezidanto enmanigis nur ses atestilojn, al: Jorge de Matos (baz.: 13/20), Luna Nunes (↖ mez.: 18/20), Rui Palma (mez.: 17/20), Maria Raposo (⬆ baz.: 18/20), Filipe Sim-sim (baz.: 11/20), kaj Rui Valério (baz.: 16/20). Sekvis rea spektado de la filmeto *Fetorafero* (*NB***95**:8), tamen ne (ankoraŭ) en nova versio. Poste, ĝis vespermanĝa horo oni kantadis el murekranaj tekstoj (tradukaj kaj originalaj) kaj partituroj: Ne gvidate, laŭ plano, ja improvize kaj iom ĥaose — sed gaje (↙). ***AMT***

ARANĜOJ:

# *KKS vizite defias*



*Ĉu nun la ĝusta horo por U.K. ĉe ni? Brazilanoj Wilson Brígido (P.E.A.) kaj Clay Magalhães (U.E.A.) parolas en la lisbona sidejo pri ebla baldaŭa okazigo en Portugalio.*

MM

Brazila esperantisto Clay Magalhães, **Konstanta Kongresa Sekretario** de U.E.A., vizitis nian landon (veture inter Lisbono kaj Koimbro) la duan semajnon de aprilo — kune kun argentinano Francisco Veuthey, nun voluntule filmisto samloke («mi enamiĝis al Portugalio kaj certe baldaŭ revenos»). Kvankam temis pri privata turisma vojaĝo, estis kontaktoj kun kelkaj lokaj movadanoj (Faria de Bastos, Martins-Tuvalkin, Wilson Brígido, Marta Martins, Gonçalves Pires) kaj la "eterna" temo pri ebla okazigo de **Universala Kongreso de Esperanto** en Portugalio (vd. *NB***44**:3, *NB***54**:5 k.m.a.) neeviteble aperis. Clay afablis klarigi, ke la nunaj kondiĉoj aparte taŭgas: Jen ke la nuna K.K.S. ja estas portugallingvano, kio malŝarĝus multe la lokan organizantaron, ke jam tre longe ne venas U.K. al sudokcidenta Eŭropo (laste Montpeljero, 1998, kaj Valencio, 1993), kio allogus grandan kongresanaron, kaj ke nenian financan malgajnon devas timi nia asocio, ĉar temas ja pri U.E.A.-evento Krome, sufiĉas nun por sukcesa U.K. multe malpli da homa laboro flanke de la **Loka Kongresa Komitato** ol en antaŭreta epoko. Tiuj relative malpli pezaj postuloj ĉe la loka movado ŝajnigas jam al kelkaj kontaktitaj portugalaj esperantistoj realigebla la projekton okazigi U.K.-on nia-lande, iam baldaŭ: Ĉu eble jam en 2016 aŭ 2017? (Okazos ĉijare en Rejkjaviko, sekve en Bonaero, poste en Lijlo.) Se formiĝos ĝenerala apoga kunsento, necesus pri detaloj ekdecidi, unua-vice pri kiu estu la gastigonta urbo… *AMT*

*GRAVA ATENTIGO:*

Nin atingis propono pri ***grandigo de la sideja lupago*** fine de marto 2013, kadre de la nova leĝa reĝimo de loĝejaj lukontraktoj en Portugalio. La proponata valoro **multe superas** la financajn kapablojn de Portugala Esperanto-Asocio, kaj la aferon la estraron prizorgadas plurmaniere. Aparte utilega estas la apogo de M. Faria de Bastos, kiu disponigis sian tutan advokatan sperton kaj influon. Ja perdo de nia sideja spaco estus neimageble malutile, kaj ni ĉiom klopodas por tion eviti. ***La Estraro***

HOMOJ:

# *Alcino honorigita!*

La ideo honormembrigi Alcinon aperis ĉe la restintaj aktivuloj tuj post lia apartiĝo de movadaj taskoj, en la somero de 2008 (*NB*91:20); ĝi finfine realiĝis dum la Ĝ.A. de 2013 (pĝ.4), je emocia staraplaŭdo. Kvankam li mem, pro familia engaĝo, ne povis ĉeesti, asocianoj Miguel Boieiro, A. S. Almeida, kaj A. Martins-Tuvalkin eldiris kelkajn vortojn pri lia vivo kaj ĝisnuna agado:

Alcino Ramos Alves (n. 1943, *Oleiros*) venis al la esperanto-movado en la fruaj 1980-aj jam kiel lisboniano, per la influo de ne malpli ol Caeiro de Sousa kaj Artur Hipácio. Baldaŭ li engaĝiĝis en la asocian laboron, kaj je la epokfara estraro de 1988 li iĝis kasisto (*NB*37: 14). Sekretariiĝis en 1993 (*NB*60:4) kaj restis dum 11 mandatoj — la plej longa estraraneco en nia asocio.

Li tenis la sekretariadon (leterojn kaj protokolojn) en bonega ordo, kaj trovis tempon por ordigi preskaŭ ĉiun fakon de la sidejaj arĥivoj, kie lia influo ĉie videblas. Ŝatata kaj respektata de ĉiuj (ekz. *NB*48:9), lia agado krome tuŝis ĉiujn flankojn de la asocia laboro: Li helpis memlernantojn, riparis sidejajn difektiĝojn, organizis eventojn, subtenis aliies projektojn kaj entreprenis proprajn, tro multajn por nombri: Dum 20 jaroj apenaŭ eĉ unu aranĝo de P.E.A. pasis sen lia apogo. Kaj, eĉ post lia "emeritiĝo" kiel forurbetano, tiu apogo ne tute ĉesiĝis (ekz. *NB*92:6).

Dum la sesio oni rememoris aventurajn erojn de lia agado, ekz. kiam en 1999 li flugis ekspresе al Bruselo, kun samtaga reveno, por enmanigi persone al la eŭroparlamentanoj asocian dokumentaron kaj tiel ŝpari afrankon… Estis ankaŭ menciitaj kelkaj aspektoj de lia eksterasocia agado, nome kiel ĉeestanto en kelkaj internaciaj aranĝoj, kaj kiel multjara estrarano de IKEK kaj kunorganizinto de ties konferenco lisbone, en 1996. Menciiĝis ankaŭ neesperantaj aspektoj, nur kelkaj konataj en la movado: Alcino kiel ĥorano, botanikisto, ruslingvano, mediprotekta aktivulo, mediamika agrikultivisto, vinŝatanto, motorciklisto, paraŝutisto… Apenaŭ menciita, ĉar evidentega, restis lia bonega rego de esperanto kaj lia fundamenta rolo en la kunkreado de malkrokodila etoso en la sidejo kaj aranĝoj de nia Asocio — kies **honora** ano li nun plenrajte fariĝis. ***Ancxjo***

MOVADHISTORIO:

# *Sukcesa esperant--tema magistriĝo*

La 4-an de decembro 2012, post prokrasto, okazis en *ISCTE* prezento de la magistriĝa diserto de Sónia Apolinário (*NB*94:9), pri sociologiaj aspektoj de la portugalia esperanto-movado en la antaŭasociaj epokoj. Antaŭ ĉ. 20 ĉeestantoj, inkl. P.E.A.-estraranoj WB kaj AMT, la sesio konsistis el parola prezento, komento de la gvidinta profesoro (Luísa Tiago de Oliveira), kaj aprezo de ceteraj la ĵurianoj (João Freire kaj Jorge de Freitas Branco). Tiuj sonis kuriozaj ĉe esperantistaj oreloj, sed ne tute negative… Kiel rezulto, aprobo je 19/20, nekutime alta. La diserto konsulteblas sideje (134 A4-pĝ.; ★B3416). Por publikigo tradukos en esperanton Alexandra Paz kaj Roger Prieto, ambaŭ esperantlingvaj historiistoj. ***AMT***

GAZETOJ:

# *Tri novaj malnovaĵoj*

Maria Albertina C. André (*) lernis esperanton junaĝe ĉ. 1946 sed memaserte ĉiom forgesis. Gazetojn akiritajn tiam enlande kaj per leteramika interŝanĝo ŝi donacis al P.E.A. en junio 2012. El tiuj aparte interesas tri rilataj titoloj, novaj (⁑) ĉe nia biblioteko: *La Unuiĝo* (Port. Esperanto-Federacio: 1946), *Unuiĝo* (Port. Esperanto-Ligo: 1947), *Informilo* (Port. Esperanto-Ligo: 1948-1949) (⁑). Surpaĝe konataj nomoj, i.a. Frazão de Faria, Karlo Porespo, kaj Werther Sacramento. *AMT*

* Ne la similnoma asociano n-ro 0062. ⁑ Iuj numeroj jam enestis.

HOMOJ:

# *Raul Picado*

Raul Joaquim Picado Júnior, emerita forĝisto kaj maŝinisto en *Beja*, forpasis 95-jara en marto 2012. Esperanton li lernis en 1933 (vd. ★G0064) sed al nia asocio li aniĝis (retpoŝte!) nur en 2004: Tre verŝajne la plej malnova kaj maljuna esperantisto je aniĝtempo, depost la asocia fondiĝo. *AMT*

LITERATURO:

# *Dankesprimo*

*Eduardo Novembro*

Komplezeme, Samideano António Martins-Tuválkin bonvolis entrepreni vere egan taskon, kunmetinte kaj aperiginte en *Nia Bulteno* **95** (pĝ.10-11) aron da kunlaboroj miaj jam disaj tra kelkaj nia-lingvaj eldonadoj — inter ili nome en la altkvalita revuo *La Karavelo*, kreita de Samideano João Santos.

El tia tre laboriga kolektado li zorgdetale organizis la perfektan liston, kiun li mem pompe titolis "Plena Verkaro" de Eduardo Novembro — mia kaŝnomo kiel aŭtoro de tiuj poresperantaj kontribuaĵoj.

Mi ja dankas kaj ja vantiĝas pro tiom simpatia faro. Tamen, neniel malestimante ĝin, mi devas atentigi la legantojn de tiu notico pri la cirkonstanco, ke la du cititaj plenpaĝoj montrantaj ŝajne okulfrapan laboregon, ampleksas aron produktitan laŭlonge de pli-malpli tridek jaroj!! Kaj tion, mi konvinkiĝis, **povos fari iu ajn alia** portugala esperantisto; sufiĉos surpaperigi, ekzemple, konversacie eldiritajn ideojn — kial ne distraĵojn, eĉ serĉojn —, aŭ plej kaŝitajn elpensojn, sonĝojn, revojn, ion ajn alian, kaj senfinajn ktp… ktp… ktp… ktp… … …-jn.

Tiele mi agis, kaj mi estas doktoro pri nenio! Nur plezure, kiel, popoldire: «Kiu plaĉe kuras, tiu ne laciĝas». **Ankaŭ vi provu! Ne timu!** Tio ne estas injekto, tute ne doloras!

Aldone, mi devas klarigi, ke en portugala esperantio mi ĉiam ricevadis nedubeblan apogon, ĉefe de nia "Kapitano" Almeida — kompetenta kaj la plej malnova nia-landa esperantisto —, kiu eĉ ne unu fojon rifuzis fari la de mi petitan gramatikan korektadon (kaj ne nur) de ĉiuj miaj malnetoj; sen lia neelĉerpebla subtenado, mi neniam estus sukcesinta. Kvankam ne multaj, feliĉe ankoraŭ ekzistas en Portugalio aliaj kompetentuloj kapablaj sammaniere helpi aliajn kunlaborantojn, kiuj volos montri en- kaj ekster-landen, ke malgraŭ ĉio, Esperanto ne pereos ĉe ni. Neniam forgesu, ke Esperanto estas kaj senlima kaj solidara lingvo.

LANDA AGADO:

# *Esperanton debute en Orienta Timoro*

HG



La konata flandra aktivulo Heidi GOES, kiu scipovas i.a. la indonezian lingvon, vizitis Orientan Timoron unu semajnon en marto 2013 kaj, same kiel en siaj afrikaj vojaĝoj (vd. ŝian libron *Afero de Espero*: 6,00 €; 86 pĝ. 210 mm; U.E.A.: *Rotterdam*, 2007; ISBN 978-929-0170-96-9), ŝi tie intervjuiĝis ĉe amasinformiloj pri esperanto kaj okazigis bazan fulmkurson. Antaŭe ŝi estis kontaktinta Faria de BASTOS, portugalan esperantiston, kiu verkis en 1998 tion kio eble estis la lasta libro (el multegaj) pri la situacio de Orienta Timoro antaŭ ol la grandaj ŝanĝoj de la nuna jarcento — la trilingvan *Timor : O maior campo de extermínio do mundo / The biggest extermination camp in the world / La plej granda ekstermejo en la mondo* (★18.023: 8,40 €; 67 pĝ. 235×140×6 $mm^3$ 130 g; P.E.A.: *Lisboa*; ISBN 972-9471-34-7). Ĉi tiu agado sekvas plurajn vizitojn al Indonezio ekde 2009 (en aprilo 2013 okazas la unua Indonezia Esperanto-Kongreso); rezulte aperis grupo da interesatoj kaj komencantoj en la ĉefurbo Dilio (⬆), kies laboron eblas sekvi rete ĉe http://sites.google.com/site/esperantoenorientatimoro/. Laŭ haveblaj informoj, ĝi estas la unua esperanto-agado en tiu lando. ***AMT***

MOVADO:

# *Libraro biblioteke*

Post la forpaso de oportia esperantisto Fernando COSTA en 2007 (*NB***90**:3), lokaj movadanoj maltrankvilis pri la kieno de lia vasta esperantlingva biblioteko, laŭ fiaskis klopodoj kontakti prie lian vidvinon Ruth MEDEIROS, ankaŭ esperantiston, retransloĝiĝintan al Brazilo. Estis do ĝojiga ekscio, komence de 2013, ke la multajn librojn, diskojn, kaj aliajn dokumentojn donacis familianoj al la loka *Biblioteca Municipal Florbela Espanca* (*Matosinhos*, Oportio). Tiun materialon nun la posedanta oficiala instanco inventarios, por kio la asocia helpo estas jam promesita. ***AMT***

MUZIKO:

# *dc pri Lx*

Eric LANGUILLAT, muzikisto el Frankfurto-ĉe-Majno, ekis en 2003 la projekton "inicialoj dc" kiu, dek jarojn poste, enradikiĝis en la loka arta sceno kiel atentinda muzikvidea kreanto. Ankaŭ en movadaj aranĝoj "inicialoj dc" prezentiĝas — ja la du plej novaj eroj de ties diskaro estas plene esperantlingvaj. Notindas "Amiko sen vizaĝ'", la deka ero el la 11-zona albumo *Signoj de viv'* (Vinilkosmo: 2012), kie la morna voĉo de Eric, kun akompano de prasintezilo kaj akustika gitaro, baladas saŭdade pri «baroka hotelo en pluva Lisbon'» dum «maten' de aŭtun' luzitana», pri «trankvila promen' en kvartalo *Alfama*» al «kafejo apud la kastel'» kun vido super «la taĵ-estuaro», kaj pri «la gusto de portugala vin'»… ***AMT***

Aŭkultu ĉe: http://initialsdc.bandcamp.com/track/amiko-sen-viza; poemoj ĉe: http://www.initialsdc.net/V3/signojdevivlyrics.htm

BULTENO:

# *NB91-94: jaron da fuŝoj**

| *NB* | *pĝ.* | *kol.* | *lin.*⁑ | *eraro* | *korekto* |
|---|---|---|---|---|---|
| 91 | 3 | 2 | ↓4 | «re gis» | «regis» |
| 91 | 5 | 1 | ↑1 | «red.» (kaj same en sekvaj paĝoj) | «Red.» |
| 91 | 7 | 2 | ↓14 | «la filmo» | «spektado de» |
| 91 | 13 | 1 | ↓8 | «Boieiro kaj» | «Boieiro, kaj» |
| 91 | 15 | 2 | ↑12 | «*Zakopane* (» | «*Zakopane* (✎» |
| 91 | 17 | 1 | ↓3 | «Marques de» | «Marques» |
| 91 | 22 | 1 | ↓18- | «okazinta la 29- -an de majo 2010» | (forigi) |
| 91 | 24 | 1 | ↓21 | «du unuaj» | «unuaj du» |
| 91 | 24 | 2 | ↑9 | «*NB***76**:2» | «*NB***76**:2-3» |
| 91 | 24 | 2 | ↑6 | «cioj (» | «cioj (*NB***66**:5; » |
| 91 | 29 | 2 | ↓13-14 | «ironia-»¶«jn» | «ironi-»¶«ajn» |
| 91 | 33 | 2 | ↑1 | «*Android*.)» | «*Android*.» |
| 91 | 34 | 1 | ↓5 | «varo,» | «varo» |
| 91 | 34 | 2 | ↓9 | «‘vera’» | «‘veraj’» |
| 91 | 34 | 2 | ↑20 | «kiujn kiujn» | «kiujn» |
| 92 | 1 | 3 | ↑6 | «9-an oka-» | «8-an oka-» |
| 92 | 2 | 3 | ↓14 | «*NB***90**:4» (kaj simile en sekvaj numeroj) | «*NB***91**:4» |
| 93 | 1 | 1 | ↓6 | «9-a IRo» | «8-a IRo» |
| 93 | 2 | 2 | ↓6 | «celoj kaj» | «celoj, kaj» |
| 93 | 3 | 1 | ↓6 | «Boieiro» | «Boieiro» |
| 93 | 3 | 2 | ↑10 | «ruini-» | «iam ruini-» |
| 93 | 3 | 2 | ↑8 | «stukon» | «stukon (*NB***82**:3)» |
| 93 | 3 | 2 | ↑3 | «subfenestra» | «por la saloneto subfenestra» |
| 93 | 11 | 1 | ↓12-13 | «sa-»¶«mtempe» | «sam-»¶«tempe» |
| 94 | 1 | — | — | «RR» | «(RR)» |
| 94 | 2 | 2 | ↓2 | «korniki» | «kroniki» |
| 94 | 3 | 1 | ↓22 | «tagmanĝen» | «vespermanĝen» |
| 94 | 3 | 2 | ↓6 | «IRO’9» | «IRO’8» |
| 94 | 5 | 2 | ↓4 | aldoni: «REA-O» | |
| 94 | 5 | 2 | ↑2-3 | «profitata» | «profitataj» |
| 94 | 7 | 2 | ↑6 | «septembe» | «septembre» |
| 94 | 8 | 1 | ↑7 | aldoni: «LK» «PEA» | |
| 94 | 9 | 1 | ↓3 | aldoni: «(RR)» | |
| 94 | 12 | — | — | aldoni: «WmC / Andre.Figueiredo» | |

(*) Vd. ankaŭ *NB***93**:11. (⁑) El la paĝsupro (↑) aŭ male (↓); inkl. titolojn ks..

VENDEJO:

# *Laste… malaperis*

Kelkaj varoj elĉerpiĝis en nia vendejo dum la lasta jaro. Ĉar ilia nombro multe superas tiun de nove akiritaj eroj, jen listo el kiu interesatoj sciigu indon mendi aŭ represi por restokado:

- **00.137** ✯ (malh. stelo + “E” + blanka eĝo / pinglo)
- **00.135** ✯ (stelo sur ronda fono kaj agrafo)
- **00.089** ʊ *Esperanto : Mondlingvo* (sako tola)
- **02.058** ⊏ *Esperanto em 30 horas*
- **01.023** ⊏ *Esperanto em Método Ilustrado*
- **02.031** ⊂ *Fundamento de Esperanto* (Edistudio)
- **17.003** ⊏ *Fratoj eble ni estas*
- **01.017** ⊏ *Gramática Completa do Esperanto* (2002)
- **05.018** ⊏ *Kokido Venĝis sian Panjon*
- **05.020** ⊏ *Lutro kaj Bufo*
- **04.006** ⊏ *Originala Esperanta Bildvortaro*
- **18.014** ⊏ *Patriotismo kaj Registaro* (k.a.: L. Tolstoj)
- **05.028** ⊂ *Praavo kaj la Kotokukoj*
- **08.175** ⊏ *Rakontoj por ĉiuj aĝoj*
- **02.019** ⊏ *Saluton! Esperanto Aŭtodidakte* (2002)
- **13.020** ⊏ *Vetero kaj Klimato de la Mondo*

Kompletan katalogon ĉe http://esperanto.pt/dok/katalogo.pdf.




PAULO JUNTAS (WMC) + AMT

REMETENTE:

**Associação Portuguesa de Esperanto**
Rua Dr. João Couto, 6-r/c A
PT-1500-239 LISBOA
PORTUGAL

DESTINATÁRIO:

| nº de sócio | últ. quota paga | foto |
| --- | --- | --- |
| *annumero* | *lasta kotizpago* | *foto* |

*laste ricevita interŝanĝnumero*
*(abonantoj kaj aldonacatoj ignoru)*